



同語

Mikrofone

6-a jaro • Oktobro-Decembro, 2008

- Regalnivela vojaĝo al la provinco Guangxi
- Esperanto estas mia mentoro





Enkonduko

Restas nur kelkaj tagoj antaŭ ol ni diros adiaŭ al la jaro 2008, kiu ja estas neforgesebla por ĉinoj, ĉu pro la sukcesplenaj kaj monde atentitaj Pekinaj Olimpikoj kaj Paralimpikoj, ĉu pro la naturaj katastrofoj de la serioza pluvneĝado en la komenco de la jaro kaj de la grandega tertremo okazinta la 12-an de majo en la gubernio Wenchuan de la ĉina sudokcidenta provinco Sichuan, ĉu pro aliaj gravaj eventoj, ekzemple tiu, ke Ĉinio sukcese pafis la spacoŝipon Shenzhou n-ro 7 kaj realigis unuafojan promenadon de astronauto en la spaco.

Ankaŭ la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia multe progresas en la jaro 2008: Ni senĉese riĉigas la enhavojn de niaj radio-programoj, ret-paĝaro kaj Mikrofone; la nombro de ricevitaĵoj korespondadoj en la tuta jaro estas historie rekorda; kaj ni okazigis kelkajn konkursojn, en kiuj multaj fidelaj aŭskultantoj fervore partoprenis.

Aparte menciinde, ke s-ro Probal Dasgusta, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, akiris la specialan premion el la konkurso “Ĉarma Guangxi” kaj gastis 2-semajne en Ĉinio. Akompanate de Lina, juna laborantino de nia redakcio, li ne nur vojaĝis al la sudokcidenta Guangxi-a Zhuang-nacieca Aŭtonoma Regiono de Ĉinio kaj ĝuis enhavoriĉajn turismajn programerojn en la regiono, sed ankaŭ vizitis pitoreskajn vidindaĵojn de Pekino, babilis kun lokaj esperantistoj kaj la tuta Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia, prelegis en Ĉina Komunikada Universitato kaj intervidiĝis kun gvidanto de ĈRI.

En tiu ĉi numero vi povas legi kaj interesajn artikolojn respektive de s-ro Probal Dasgusta kaj Lina, kaj nian intervjuon, en kiu li malkaŝis siajn esperantistiĝon kaj plej fruajn E-agadojn.

Ĉe tiu ĉi speciala momento de la jarfino mi, nome de la tuta Esperanto-redakcio, deziras al vi ĝojigan Kristonaskon kaj feliĉan Novjaron!

Prosperon kaj ĉion bonan en la baldaŭ venonta nova jaro!

Amike via,

Jianping Zhao

Regalnivela vojaĝo al la provinco Guangxi

Probal Dasgupta

Iuj el la auskultantoj de Ĉina Radio Internacia, sukcesinte ĝuste respondi ĉiujn erojn en konkursa kvizo pri diversaj faktoj rilate la ĉinan provincon Guangxi, ricevis premie inviton viziti dum unu semajno tiun provincon – kune kun aperitiva kaj deserta restadoj en Beijing.

Se mi elektas komenci per figura uzo de ‘aperitivo kaj deserto’ la prezenton de mia partopreno en kolektiva, naugasta turismado en Guangxi, tion spronas la grava rolo de la manĝoj en la ĉina gastamo. Ĉi tiu reliefigo de la kuirarto ĉe la ĉinoj kaj de la manĝarto ĉe la gastoj estas aparte ĝustatempa pro la kurioza fakto, ke ĝuste ĉi-jare centjariĝas la mondfama antropologo Claude Lévi-Strauss, kiu elstarigis la manĝojn kiel la intervizaĝon inter la naturo kaj la homaj, kulturaj, prilaboroj de ĝi. Prezentante al ni la belan provincon Guangxi, la ĉinaj gastigantoj emfazis la duflankecon – naturan kaj kulturen – de tiu beleco, kiel evidentiĝos dum mia priskribo.

Nia kungastado komenciĝis jam dum la flugo per ĉina aviadilo de Delhio al Pekino. La gastoj en ĉi tiu unika programo komencis interkonatiĝi. La nepalano M.B. Khatri, premiito de la nepallingva redakcio de CRI, kaj la baratano Yogeshwar Tyagi, premiito hindilingva, kunflugis kun mi, kiu devis de Kolkato unue ĝisflugi ĝis Delhio por povi aliĝi al la ekspedicio.


En la flughaveno en Pekino nin varme akceptis interpretista teamo el CRI, kun kiu ni alhotelis, instaligis, kaj la postan tagon formale ceremoniis pri la premioj mem. Ni ne konis Pekinon, sed ĝin bonege konas la legantoj, pro kio mi turnos la paĝojn de nia sperto rekte al la momento de ekvojaĝo al la provinco. En la 30a de novembro ni flugis de Pekino al Nanning, la ĉefurbo de Guangxi, kaj instaligis en bela hotelo. Dume jam ekis nia iniciĝo en la arton



manĝi ĉine. Ni tial trafis noti, ke en tiu provinco aldoniĝas al la ĉieaj ĉinaj viandoj la lokaj legomoj kaj fiŝoj, kaj ke la legomoj, ne nur kiel apartaj pladoj sed kiel kunviandaĵo, alikarakterigas la tutan manĝon. Tiun reagordon kunhelpas ankaŭ iom da spicoj, sed la kuirarto de Guangxi tute ne estas spica laŭ baratataj aŭ meksikaj normoj.

En Nanning aliĝis al nia taĉmento tiuprovinca ĉiĉerono, kiu montriĝis esti anino de la ĵuangoj – unu el la gravaj naciplimulto en Ĉinio, kaj aparte grava en tiu provinco, kie ili estas fakte la ĉefa etno. Ŝi konatigis nin kun io, kion bone konas la ĉinoj – la broditaj pilkoj, kiujn ĵuang-naciaj junulinoj tradicie ĵetas al junulo por konigi sian amon; hodiaŭ, tra la tuta Ĉinio, tiuj pilkoj iĝis konata ludilo, kaj ĝi kutime signifas nur la amikecon kaj la ludemon. Ĉiuj ĉinoj konas la gravecon de la provinco Guangxi, la hejmo de la broditaj pilkoj. La ĉiĉerono konatigis al ni la rolon de Nanning, la ĉefurbo de tiu provinco; en tiu urbo, pli frue ol en la cetera Ĉinio, la gejunuloj en la moderna epoko komencis memstare elekti siajn vivpartnerojn. La urbo restas konata pro sia kulturo de amo – kaj ĉi tiun temon la ĉiĉerono prezentis sprite kaj kun aludoj al sia fraulineco.

Sub ŝia gvido, ni startis de Nanning la postan matenon kun la scio, ke ni traturismos tra la tuta provinco dum la semajno. La planon viziti ekspozicion pri la atingoj de la provinco Guangxi dum siaj kvindek jaroj da formala ekzisto nia ĉiĉerono devis nuligi pro nekongruo de datoj. Oni elektis por ni bonan anstataŭaĵon. Ni vizitis ŝtonan ĝardenon. Tie estis klaraj specimenoj de la plej diversaj karstaj formiĝoj. Pri la naturo de la karsto ni devis konsulti enciklopediajn fontojn jam dum la konkurso. Tial multaj inter ni sciis, ke la erozio kreas bele truitajn kaj





strangformatajn ŝtonaĵojn, jen blankecajn jen grizecajn laŭ la preciza kemia konsisto. Sed nun ni vere vidis karston, en grandaj kvantoj, en zorge prezentitaj specimenoj. Sed oni ne forgesis emfazi al ni la rarajn arbojn kaj plantojn zorge konservitajn en la tuta provinco. Ankaŭ tiu ĝardeno havis kelkajn ekzemplojn.

Dum la manĝoj en tiu tago ni rimarkis, ke en Ĉinio kun la viandaj pladoj tre ofte venas buntaj legomoj – bona ekzemplo de la arto zorge elekti akompanaĵojn. Aparte en la provinco Guangxi mi komencis rimarki, ke iuj lokaj legomoj agrable variigas la guston de la viandoj.

En la posttagmezo ni aŭtobusis al la akvofalo Detian. Survoje ni aŭdis pri la rivero, kiu markas la landlimon inter Ĉinio kaj Vjetnamio. Ni aŭdis, ke la akvofalo estas unu el la plej grandaj ĉe iu ajn internacia landlimo. Survoje al la akvofalo ni spertis boatan ekskurson sur la rivero per belaj boatoj. Nia boatisto vigle kantis. Poste ni desupris laŭ sufiĉe zorge faritaj ŝtupoj ĝis la akvorando kaj vidis la akvofalon Detian. Ni konstatis, ke troviĝas maldekstre iom modesta kaj dekstre pli larĝa akvofalo, kaj ke ili apartenas al Vjetnamio kaj Ĉinio. Ni notis ankaŭ la kolorkodigon de la boatoj – la bluaj vjetnamaj kaj la verdaj ĉinaj. Ni hotelis tiunokte apud la akvofalo Detian.

La horaro menciis viziton al la ravino Tongling. De tio ne estis klare, ke necesos desupri laŭ okcent ŝtupoj, multe iri laŭ la vojoj de tute rava ravino, kaj poste trafi tute aventuran boaton ekskursan. Ni eĉ ne boatis, sed floris per kaŭĉukeskaj, eble parte plastaj flosoj, laŭ torentema rivero. La tre lertaj boatistoj veturigis nin, ankaŭ tra tri kavernoj, kie niajn kapojn minacetas stalaktitoj kaj ni devis uzi lampon por vidi ĉirkaŭ ni. Neniam mi havis okazon boati aŭ flosi tra mallumaj kavernoj laŭ rapidflua rivero kun tiom da ŝtonoj. Mi tre ĝuis la sperton kaj forte rekomendas ĝin. Ni feliĉe ne bezonis okcentŝtupi denove supren; oni uzis aŭtobusetojn por nin veturigi per alia vojo al tiu punkto, kie atendis nia granda aŭtobuso.

Poste ni veturis al Jiuzhou kaj konatiĝis kun tiu strato, kie ĵuangoj per tradiciaj metodoj produktadas broditajn pilkojn. Ni ankaŭ vizitis muzeon, kie troviĝas ekspozicioj klarigantaj la kulturon de la ĵuanga nacimalplimulto. Survoje ni vizitis ĵuangan templon, de kiu ni trovis bildon en la muzeo.

La postan tagon, dum la aŭtobusado, la ĉiĉerono prezentis al ni alian aspekton de la brodita pilko. Oni povas ĝin uzi kiel ilon en grupa ludo. Ni lernis de ŝi ludon, en kiu ŝi, la ludiganto, turnas al ni la dorson kaj diras tom tom ĉiang tom tom ĉiang, dum ni rapide pasigas la pilkon de mano al mano, kaj kiam ŝi subite krias "haltu", la persono, kiu tiam tenas la pilkon, devas stari antaŭ la grupo kaj kanti ion.

La afero sonas simpla. Sed grupestro, kiu funkciigas tian ludon, devas trakti kun la bonhumoro kaj malbonhumoro de diversaĝaj homoj, kiuj ne sufiĉe dormis, kaj estas ŝia tasko vigligi la etoson sen tro mobilize kaj soldate devigi tion. Mi devas diri, ke nia ĉiĉerono brile sukcesis en tiu laboro – ni en Esperantujo estas spertuloj pri la "etosoj" de kongresoj, kaj la etoso en tiu aŭtobuso dum la grupa ludo estis bonega. Iuj el ni kapablis kanti, iuj ne, kaj multaj spicis la kantadon per prelegetoj – ĉion la grupestro sukcesis prezenti kiel tute naturan, atenditan, kaj parton de la amika tutaĵo. Temis ne nur pri la gastoj, sed ankaŭ pri iuj el la akompanantoj, kiuj montriĝis bonegaj kantantoj.

Post tiu kultura interludo dumvetura, ni atingis teman parkon, kiu prezentas la naturan kaj kulturen medion de la Ĵuang-nacieco. Ni ricevis en la manĝejo de tiu parko ne nur bonan tagmanĝon, sed ankaŭ guston de la gastamo de la ĵuang-popolo; junulinoj vestitaj en la tradicia etna kostumo salutvortis dum la tagmanĝo kaj tostis kun ni. Poste ni rigardis specimenojn de la ĵuanga pravivo en aktiva formo – la diversajn ilojn por ekzemple mueli grenon aŭ kuiru ni vidis en funkciigata stato. Mi rimarkis, ke ankaŭ inter la ĵuangoj troviĝas tiu bambua danco, kiun mi antaŭe vidis inter la aborigenoj de la nagaa nacieco el



la gubernio Nagalando en Barato.

Ne nur temis pri la materia kulturo. Oni ankaŭ donis al ni la okazon por preni incenson kaj bruligi ĝin antaŭ ĵuangpopola dia ikono, kiun oni en tiu parko kultas. Iuj el la ekspozicioj en la parko klarigis aspektojn de la ĵuanga mitologio – ni komencis iom koni iliajn heroojn kaj diojn.

Post la vagado tra la kulturo de la ĵuangoj oni promenigis nin tra ilia ĉirkaŭnatura, specife dirite, tra karsta kaverno. Troviĝas en ĝi multe da formiĝoj naturaj, kiuj al la okuloj de la vidantoj aspektas kiel homaj aŭ kulture gravaj figuroj. Iujn el la formiĝoj oni reliefigis per farbado. Sekvis aŭtobusa reveturo al la provinca ĉefurbo Nanning.

Unu trajto de la vojaĝo tra la provinco Guangxi memorigis min pri mia vizito en 2003 al la distrikto Darĝiling en Barato. De tiu distrikto devenis Tenzing Norge, kiu kun Edmund Hillary konkeris la himalajan montopinton Ĉonglungma (la anglalingvanoj pli bone konas ĝin sub la nomo 'Everesto') en 1953. En 2003, festante la 50-jariĝon, la darĝilinganoj reliefigis sian gravecon en Barato. Multaj barataj turistoj ĉiujare gustumas la unikecon de Darĝiling. Estas io simila pri la tutlanda konateco de la turismaj allogoj de Guangxi. Tial la festonoj en Guangxi festantaj la 50-jariĝon de la provinco memorigas min pri tiuj, kiujn mi vidis okaze de alia 50-jariĝo, en nia distrikto Darĝiling. Kaj kompreneble mi pensas pri aliaj jubileoj – UEA ĉi-jare iĝis centjara, venontjare ni festas la 150-jaran naskiĝ-datrevenon de Zamenhof, kaj tiel plu.

La postan tagon, post matena aŭtobusado de Nanning al Liuzhou, ni instaliĝis en la hotelo kaj sufiĉe baldaŭ eliris por viziti ĝardenon, kiu ekspozicias kuriozajn ŝtonojn. Ĝi nomiĝas Dalongtan, aŭ Lago de Granda Drako. Tie ni ne nur havis okazon por vidi tutan antologion da ŝtonoj kolektitaj de ĉie en la provinco, sed ankaŭ konstatis, ke por kuraĝigi la aprezadon de ilia beleco la administracio jam de pluraj jaroj okazigas internacian festivalon de kuriozaj ŝtonoj kaj premias aparte notindajn trovaĵojn. Mi vidis ekspoziciajn premiitan dum la kvina festivalo, kio iom indikas la daŭron de ĉi tiu klopodo.

Alia parto de la sama ĝardeno prezentas apartaĵojn de la Dong-nacieco – ekzemple tipan dongan domon kaj tipan dongan ponton. Sed kaptis nian atenton la lago mem, kie laŭ antikvaj legendoj loĝis drakoj. Ni aŭdis pri la Tang-dinastia oficisto Liu Zongyuan, kiu venis al tiu regiono kaj regis kiel urbestro de Liuzhou. Li preĝis por la pluvo kaj konstruis altaron en loko, kiu nun situas en la ĝardeno Dalongtan. Ni vizitis tiun altaron kaj havis okazon aŭdi pri la atentinda vivo de tiu pensulo, kiu devenis de norda Ĉinio kaj kontribuis tiel multe al la reliefigo de Liuzhou – kaj de



la provinco Guangxi.

La urbo Liuzhou estas industria urbo kaj situas centre en Guangxi, kio jam igas ĝin sufiĉe atentinda. Se ni ial emus tamen ne atenti, certe ni trovus nin devigataj rimarki, ke ĝia rivero havas unike grandan akvofalon – la plej grandan home faritan akvofalon en la mondo – kiun oni montris al ni post la vespermanĝo dum krozado tra la urbo por ĝui la noktan belecon de la regiono.

Ni unue aŭtobusis de Liuzhou al Guilin, instaliĝis hotele, kaj aŭtobusis tuj al Ĝardeno de Sep Steloj, kie ni admiris pandojn kaj pavojn, kaj trian p, la pladojn de tre bela tagmanĝo. La tujposta vizito, al la Fubomonta Ĝardeno, daurigas la kuiran temon. Tie troviĝas poto sufiĉe granda por kuiri por mil manĝontoj. La posttagmeza vizito al la Elefanto-naza Pejzaĝejo resendis la emfazon al la ekstera naturo. La malfruan vesperon nia brigado dediĉis al vizito al la noktaj belajaĵoj de la urbo Guilin.

La tagordo de la 6a de decembro estis sufiĉe plena. Dum la aŭtobusado ni aŭdis, ke ni boatos sur la rivero Li. Kaj dum tiu kvarhora ekskurso ni vidis pejzaĝon, kiu sukcesis allogi multegajn turistojn. Parton de tiu pejzaĝo eĉ bildigas la dorsflanko de la dudekjuanaj monbiletoj.


Post la boatado – kiu inkluzivis tagmanĝon – ni instaliĝis en hotelo en Yangshuo. En la vespero oni transportis nin al teatra prezentejo parte ĉe kaj parte sur la akvo. Tie prezentiĝis teknike treege lerta kaj impona opero rememoranta la legendan Ĵuangnacionon Liu Sanjie. La ĉina nomo signifas "tria fratino de la familio Liu" – kaj mi povas esprimi ĝin en mia denaska bengala lingvo per la traduko "Ŝeĝobon Liu". Survoje al la prezento mem mi hazarde haltetis antaŭ iu stando, kie oni ĝuste tiam estis televidantaj filmon pri Liu Sanjie, kaj kie mi do havis okazon vidi kun subtekstoj parton de la kantoj, per kiuj Liu Sanjie mokis kaj kritikis la feŭdisman ordon – kaj vidi, kian efikon (laŭ la legendoj) havis ŝiaj kritikoj sur la publikon de tiu epoko. Mi ĝojas, ke dum mi

atendis la aliajn anojn de nia brigado mi hazardis vidi tiun filmeron, ĉar tio tre helpis min aprezi la tuj postan spektaklon.

La spektaklo estis vere impona. La perfekta ĥorigo de preskaŭ sepcent homoj rolantaj en la prezento, la rapida remado de boatoj fare de aktoroj, la uzo de veraj montetoj malantaŭ la akvo kiel scenejeroj – ĉio ĉi estis senprecedenca en mia sperto de teatraj prezentoj.

Antaŭ ol forlasi la aŭtonoman regionon Guangxi (tio estas la oficiala nomo de tio, kion ni pro konveno nomas la provinco), ni vizitis en la 7a de decembro ĝardenon, kiu kombinas vidaĵojn de la naturo kaj la kulturo, denove. Ĉi-foje temis pri ĝardeno montranta tipajn agadojn de nacimalplimultoj (Dong, Zhuang kaj Miao) kaj fojfoje invitanta nian aktivan partoprenon. Interalie ni kundancis kun aborigenoj kaj en korbopilka stilo salte konkursis por gajni broditajn pilkojn. La ĝardeno sin ne limigas al elmontrado de apartaĵoj de la nacimalplimultoj kaj de naturbelajaĵoj. Oni ankaŭ prezentis vivan demontron de la artoj, sur kiuj baziĝas la mondfamaj klasikaj ĉinaj artoj de kaligrafio kaj presado---de la produktado de artocela papero, tra la kaligrafio superpapera kaj surligna, ĝis la presado per tiaj blokpresiloj, kiajn pioniris ĝuste la ĉinoj. Ĉiu el ni ricevis specimenan freŝe presitan folion kiel memoraĵon.

Ni aŭtobusis al hotelo en Guilin kaj tie tuj post tagmanĝo partoprenis kunvenon kun oficistoj el la turismaj administracioj de Guilin kaj Guangxi. Oni estis petinta nin prezenti tie opiniojn kaj proponojn surbaze de nia sperto kiel turistoj travizitintaj la tutan provincon. Por ŝpari ĉies tempon, ni verkis tekstojn kaj niaj interpretistoj skribe tradukis ilin; tiujn tekstojn ni kaj niaj interpretistoj laŭtleĝis dum la kunveno. Inter ĉiuj gastoj nur mi havis sugestojn (ke oni en ĉiu hotelo liveru en la matenmanĝejo la eblon tei aŭ kafi, kaj ke hoteloj atendantaj klientojn de najbaraj landoj disponigu laŭ klienta peto tajlandan, vjetnaman, korean aŭ japanan tradukon de la hotelĉambra klarigolibro, aldone al la nun uzataj ĉina kaj angla).



Mi sentis embarasiĝon pri tio, ke mi donis la impreson esti malpli laŭdema ol la aliaj. Sed la organizantoj de la kunveno eksplicite bonvenigis la sugestojn. Mi kompreneble aliĝas al la laŭdado de la pintaj beleco de la pejzaĝoj kaj atingoj de la provinca turisma industrio. Tamen, kiel mi klarigis dum la aŭtobusa paroladeto survoje al la flughaveno, mi iam direktoris programon, kiu gastigas fremdulojn, kaj tial mi parolas iom kiel kolego kaj ne nur kiel kliento.

Al la impresoj pri Guangxi mi nun aldonu miajn impresojn pri Beijing. Tiun urbon mi spertis dum du tagoj antaŭ kaj dum tri tagoj post la vojaĝado tra la provinco Guangxi. En la antaŭtagoj, temis interalie pri vespermanĝo restoracia kun iuj anoj de Ĉina Esperanto-Ligo. Ili regalis min per la fama pekina anasrostaĵo kaj per vigla kaj interesa konversaciado en Esperanto. Temis ankaŭ pri la premiada ceremonio, okaze de kiu ni en la vojaĝbrigado havis la okazon pli bone kompreni la kadron, ene de kiu estis aranĝita la tuta sperto, kaj la celojn, ĉirkaŭ kiuj la turisma administracio kaj Ĉina Radio Internacia volis ligi la interesiĝojn kaj la percepto-kapablon de la vojaĝantoj kun la granda laboro plibonigi la staton de la turisma industrio en la belega provinco Guangxi. En la pekinaj tagoj post Guangxi, ni revenis al la specifaj gastigantoj – Ĉina Radio Internacia – kiuj partneris kun la turisma administracio de Guangxi por povi donaci al la premiitoj la premian viziton.

Dum tiuj lastaj tagoj, CRI konatigis nin kun iuj vidindaĵoj de Pekino. Ni vizitis Tian-an-men kaj la Malpermesitan Urbon; ni pasigis liberan posttagmezon sur komerca strato (mi elektis eniri librovendejon kaj kun la helpo de la interpretisto konatiĝi kun la proksimuma gamo, kiun reprezentas la libroj en la filozofia fako); ni vizitis la Grandan Muron de Ĉinio, unu el la mirindaĵoj de la mondo; la Esperanta redakcio aranĝis por mi prelegon en la Komunika Universitato de Ĉinio antaŭ la gestudentoj en la Esperanta kurso. Aliflanke, CRI konatiĝis kun ni mem. Oni surbendigis detalajn intervjuojn kun ni. Diversaj stabanoj de CRI

individue kaj kolektive konversaciis kun ni.

Tiu tempo en Beijing ebligis al ambau partioj en tiu ĉi kune funkciigita vojaĝado plibonigi sian komprenon de tio, kio estis atingita dum la turismado. El tio venis pli klara mandato por la vojaĝintoj, kiuj en la estonteco facile povos do en siaj medioj ludi la rolon de ambasadoroj por la autonoma regiono Guangxi. Estas granda honoro por ni ludi tiun rolon en nia kreskanta parenceco kun unu el la plej laboremaj nacioj en la homa historio. Mi mem – ĉar mi reprezentas ne nur la lingvon Esperanto sed ankaŭ la kulturon de Bengallando, kies historie plej renoma ekzemplo Robindronath Tagor vizitis Ĉinion en la dudekaj jaroj

kaj en sia internacia universitato en Santiniketan iniciatis la instruadon de la ĉinaj lingvo kaj kulturo – havis aparte altajn atendojn dum ĉi tiu vizito. Mi feliĉas raporti, ke la vizito superŝutis min, kaj ke mi ricevis multe pli riĉan festenon, ol mi atendis. Mia ambasadora tasko estos facila – mi bezonas nur diri al ĉiuj, kion mi spertis.

Kaj ĉion, sendube, kronas la ĉina arto kuiru, la ĉina arto trovi ĝustajn akompanojn por ĉiaj ĉefpladoj, ne nur la manĝaj. Ĉi-rilate la ĉina civilizo havas celojn similajn al la antropologo Lévi-Strauss, kies centjara jubileo estis la komenca temo de ĉi tiu eseo kaj rajtas aperi ankaŭ en ĝia fino.

Mia vojaĝo kun Probal Dasgupta en Ĉinio

Karaj legantoj, invitite de E-redakcio de Ĉina Radio Internacia, s-ro Probal Dasgupta, nuna prezidanto de Universala E-Asocio, faris senpagan 13-tagan vojaĝon en Guangxi, aŭtonoma regiono en suda Ĉinio, kaj en Pekino, ĉefurbo de Ĉinio, dum la periodo de la 28-a de novembro ĝis la 10-a de decembro, kiel speciala premiito de konkurso pri turismaj scioj de “Ĉarmo de Guangxi” kunorganizita de Ĉina Radio Internacia kaj la Turisma Administracio de Guangxi-a Zhuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Dume, mi kiel interpretistino bonŝance akompanis lin en la tuta vojaĝo, kiu, ĝenerale dirite, estas rimarkinde kontentiga kaj sukcesa. Nun bonvole lasu min rakonti la vojaĝon en tagnota formo al vi, karaj legantoj de “Mikrofono”.

28-an de novembro vendrede serena

Antaŭ ĉio, mi volas aldoni epizodon. Mi neniam vidis s-ron Probal Dasgupta antaŭ la vojaĝo kaj mia unuafoja kontakto kun li komenciĝis antaŭ kelkaj tagoj per telefona sciigo pri oficiala invitilo. Kaj en la telefono aŭdiĝis “ina” voĉo. “Lia edzino? Lia kolegino?...” tiuj demandoj tuj venis al mia kapo. Aŭdinte “Mi estas Probal Dasgupta”, mi eĉ suspektis, ĉu mi misaŭdis. Tamen la “ina” voĉo konfirme vere venis de li. Mi esperas, ke mia malkaŝema kaj ŝercema eldiro ne kolerigos nian karan gaston:)

Tiutage en pekina flughaveno mi finfine propraokule vidis Probal Dasgupta, kiu, bedaŭrinde, ne surhavis naciecan robon pro timo de vintra malvarmo en Pekino. Bedaŭrinde, mi eble donis al li troan atentigon pri vintra malvarmeco en Pekino, timante, ke li, kiu longtempe vivas en tropika zono, ne povas kutimiĝi al vintra temperaturo de Pekino.

Mi poste trovis, ke Probal Dasgupta fakte flue kaj rapide parolas en Esperanto kaj lia voĉo estas ne

tiel “ineca” kiel en telefona babilado, kiu troigis la “inecon”.

Menciindas, ke tio estas la unua fojo ne nur por Probal Dasgupta sed ankaŭ por mi vojaĝi al Guangxi, tial ni tiutage urĝe atendis kiel eble plej frue viziti ĝin.

29-an de novembro sabate serena

Oportune de vespera libertempo, ni laŭrivere promenis. Intertempe Probal Dasgupta rimarkigis min: Sur la rivero staras akvofala ponto, kiu estas brilanta en diversaj koloroj. “Belega!” Ĝi estas la plej bela ponto vidata de mi. Nanning vere estas kreiva urbo, kiu surprizas nin per neatenditaj konstruaĵoj. Dum promonado, nia kara gasto Probal Dasgupta ĉirkaŭigis la orelojn per kaptuko kaj aspektis kiel “ina”. Vidinte tion, mi ne povas min deteni de ridetado kaj ŝerce diris al li: “Vidu, vi nun aspektas kiel maljunulino. Saluton, maljunulino!” Mi mansvinge salutis lin kaj li ridetadis. La aspekta “ineco” memorigas al mi “inecon” de lia voĉo. Li vee diris, ke mi estas ne la unua, kiu atentigas lin pri la “ineco”. Hahah, ŝajnas, ke lia “ineco” estas vaste konata ankaŭ de aliaj homoj. Tamen la “ina” Probal Dasgupta estas sufiĉe simpatia.



30-an de novembro dimanĉe serena

Ĉi-matene okazis premi-dona ceremonio al specialaj premiitoj de konkurso pri turismaj scioj de

“Ĉarmo de Guangxi” kunorganizita de Ĉina Radio Internacia kaj la Turisma Administracio de Guangxi-a Zhuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. En la ceremonio okultrafa estas tio, ke 6 belaj knabinoj kun moda kostumo delikate faris prezentadon de ĉinaj tradiciaj instrumentoj. La prezentado multe interesis niajn premiitojn kaj venigis al ĝi varmaj aplaŭdoj.

En tagmeza bankedo, lerta uzado de manĝbastonetoj venigis al Probal Dasgupta multajn laŭdojn. Iuj ĉinaj koleginoj miris: "Via-redakcia premiito sufiĉe lerte uzas ĉinajn manĝbastonetojn. Ĉu li ofte uzas?" Tio estas sufiĉe rimarkinde brila punkto de Probal Dasgupta. Vidu, iuj premiitoj tute ne scipovas uzi manĝbastonetojn dum li estas tiu, kiu pleje lerte uzas.

Satiĝinte, ni poste vizitis plantoĝardenon, kie ekzistas pli ol 1 500 trezoraj plantoj kaj iuj endanĝeraj specoj, kiuj sin trovas nur en la aŭtonoma regiono Guangxi. Kvankam Probal Dasgupta aspektas serioza en la okuloj de aliaj kunvojaĝantoj, tamen miaopinie li ĉiam havas infanecan koron. Ekzemple, vidante statuojn de du dinosaŭridoj en la ĝardeno, Probal Dasgupta intime karesis ilin kaj ŝercis: "Oh, miaj amindaj filoj!" Mi oportune fotis intiman agon inter li kaj liaj "amindaj filoj". Alifoje starante antaŭ miljara cikaso en la sama ĝardeno, li diris al mi: "Lina, vidu! Antaŭ ĝi, mi estas sufiĉe juna, ĉu ne?" Mi ridis: "Prave. Antaŭ ĝi vi ankoraŭ estas infano. Bona infano, rigardu min. Mi fotu vin".

Sincere dirite, mi mem ne povas min deteni de admiro pro tiea multeco de plantoj, kiuj plejparte estas neniam konataj de ordinaruloj. Tie estas multaj interesaj aferoj, ekzemple, alilokaj cikasoj floras post multegaj jaroj, tamen ĉi tie cikasoj ĉiujare. Ĉu vi povas imagi, ke ekzistas eĉ virinfloro kaj virfloro de cikaso?



1-an de decembro lunde serena

Ni laŭvoje vizitis kelkajn lokojn, inter kiuj menciindaj estas Guichun-Rivero kaj akvofalo Detian. Ni bambuflosis en Guichun-Rivero (la ideogramo "gui" signifas revenon kaj "chun" printempon. Bona nomo estas la rivero, ĉu ne?). Akvo estas pure travidebla kaj akvoherboj smeraldigas la riveron. Ni ĉiuj estis

absorbitaj de la medio: Densaj arboj tapiŝe ornamas montojn; aŭdiĝas nur naciminoritataj popolkantoj kaj klara sono de fluanta akvo. La flosa malrapide antaŭeniĝis kaj ni ĉiuj mire ĝuis eksterordinarajn kvietecon kaj belecon. Vortoj estas palaj por priskribi la medion. Kiel diras la ĉina proverbo: "Unu vido pli valoras ol cent aŭdoj!".

La alia menciinda loko estas akvofalo Detian (la ideogramo "de" signifas meriton kaj "tian" ĉielon), kiu estas la azie plej granda landlima akvofalo kaj la monde dua. Estas interesa fenomeno, ke tie fakte vidiĝas du akvofaloj unu apud la alia. La relative malgranda apartenas al Vjetnamio kaj la pli granda al Ĉinio. Akvofalo Detian ĝuste estas la pli granda. La akvofalo longas je 200 metroj kaj larĝas je 75 metroj, se mi ĝuste memoras. Dum aliaj homoj aktivis en fotado, mi kaj Probal Dasgupta preferis silente spekti antaŭokulan belecon kaj aŭskulti ĉeorelan akvosonon, starante sur bambua platformo.

2-an de decembro marde serena

Ni vizitis ravinon nomatan Tongling, en Jingxi, gubernio de Nanning. Tie gastamaj zhuang-naciminoritataj knabinoj igis ĉiujn gastojn surporti broditajn pilkojn antaŭ la brusto. Vidinte, ke Probal Dasgupta surhavas 2 pilkojn antaŭ la brusto, mi ŝercis: "Vi estas sufiĉe ĉarma. Vidu, knabinoj ŝatas vin. Kiel feliĉa vi estas!". Tio evidente ĝojigis lin. Ankaŭ li scias, ke brodita pilko estas am-objekto en Zhuang-naciminoritato. Kompreneble, nuntempe broditaj pilkoj simbolas ankaŭ amikecon, bonŝancon kaj tiel plu.

Posttagmeza flosado, laŭ lokanoj, bezonas "3 diurnojn". Kial? Sekvu nin kaj poste vi tute komprenos. Sufiĉe dika kaj sekura plasta flosa entenis min kaj flosiston, kiu stiris la floson per remilo. Spektante dubordajn pejzaĝojn, mi ĝoje babilis pri moroj de zhuang-naciminoritato kun la flosisto, kiu mem estas zhuang-naciminoritato. La rivero estis parte torenta kaj parte kvieta. Tie ni flosis entute tra 3 kavernoj: la unua kaverno longas je pli ol 180m, la dua je 360m kaj la tria je pli ol 600m. En la unua kaverno elstaraj pendantaj ŝtonoj minacetas nin, tial ni devis klini la kapon. Enironte en la tri mallumajn kavernojn, ni devis anticipi lumigi mane tenatan lampon por vidi ĉirkaŭaĵojn. Mi neniam havis okazon flosi tra mallumaj kavernoj laŭ rapidflua rivero kun tiom da ŝtonoj super la kapo. Karaj legantoj, ĉu nun vi komprenas la lokan diron: "Flosado bezonas 3 diurnojn?". Vidu, oni trifoje flosas en kavernoj mallumaj kiel noktoj, kaj tiele estiĝis la diro.

Kontraste, kompatinda paro estis Probal Dasgupta kaj lia flosisto, kiuj silentis dum la tuta flosado pro posedo de neniu komuna lingvo.



Vespere ni vizitis faman hejmlokon de broditaj pilkoj Jiuzhou, kie ĉiuj familioj povas lerte brodi pilkojn. Ĉie videblas belegaj pilkoj. Oni ankaŭ povas ĉeflanke rigardi la tutan procezon de brodado. Mi vidis, ke la loko estas vilaĝo kun bone konservitaj antikvaj konstruaĵoj kaj pilkobrodan metiarton. Ĝuste tie Probal Dasgupta akceptis intervjuon de loka radio, ne malŝparante bonajn vortojn pri tieaj bone konservitaj konstruaĵoj kaj pri tiuj belegaj broditaj pilkoj.

Dum aprecado de tiuj delikataj kaj belaj pilkoj, brila ideo venis al mia kapo: mi tuj aĉetis kelkajn por aliaj koleginoj, kiuj ankoraŭ diligente laboras en Pekino. Pensite, farite! Ses diverskoloraj broditaj pilkoj poste estis en mia sako. Estis tute nenecese por mia kunvojaĝanto Probal Dasgupta aĉeti broditajn pilkojn, ĉar en lia sako jam estis kelkaj donacitaj de aliaj.

3-an de decembro merkrede serena

Survoje de duontaga aŭtobusado al Nanning, ĉefurbo de Guangxi, nia ĉiĉeronino aktivigis grupan ludon per brodita pilko. Do kiamaniere oni funkciigu la ludon? Nun mi reaperigu tiaman okazintaĵon. La ĉiĉeronino kiel ludiganto turnis al ni la dorson kaj diradis “don don ĉiang, don don ĉiang.....” dum ni rapide pasigis la pilkon de mano al mano. Kiam ŝi subite kriis "haltu", tiu, kiu tiutempe tenis la pilkon, devis stari antaŭ la grupo kaj kanti. Mi volas diri, ke la ĉiĉeronino estis tiel kapabla, ke ĉiu premiito tenis la pilkon tuj ĉe la halto de “don don ĉiang”. Ankaŭ nia kara gasto Probal Dasgupta devis kanti antaŭ la aŭtobusa brigado, kaptinte la pilkon tuj post halto de “don don ĉiang”. La freŝa ludo vekis grandan intereson de niaj brigadanoj kaj en la aŭtobuso regis bona etoso plena je ĝojo kaj ridado.

Ni poste ricevis ne nur bongustan tagmanĝon sed ankaŭ gastamon de zhuang-naciminoritato en antaŭurba ĉeftem-parko, kiu vivece prezentis al ni naturan kaj kulturan mediojn de la naciminoritato.

En la parko ĉie videblas sovaĝaj simioj. Antaŭ eliro el la manĝejo, ni jam estis sincere atentigitaj ne malfermi sakojn antaŭ la okuloj de simioj, alie,

misopinianta, ke en sako estas manĝaĵoj, ili “atakos” sakojn kaj eble vundos sakportantojn. Bedaŭrinde, bela koleginino forgesis la sinceran atentigon. Kiam ŝi eliris el la manĝejo kun travidebla sako da oranĝoj, amaso da simioj tuj rapidege kuris rekte al ŝi. Vidinte tion, ŝi kriis kaj forĵetis la sakon, kiu poste estis disŝirita de simioj kaj kies enaj oranĝoj estis tuj disrabitaj. La kompatinda koleginino eĉ admiris pri rapideco de tiuj malgrandaj simioj kun brile griza hararo. Sincere dirite, tiuj simioj multe vigligis la parkon. Mi eĉ ŝercis kun Probal Dasgupta, ke li estas sufiĉe “juna” kompare kun tiuj amindaj simioj, kies vizaĝoj estas plenaj de sulketoj.



4-an de decembro jaŭde nuba

Nun mi turnu vian atenton al ĝardeno en Liuzhou, industria urbo en Guangxi. La publiko jam aprecis belecon de kuriozaj ŝtonoj en la ĝardeno en antaŭaj ĉirilataj internaciaj festivaloj.

Oni povas libere imagi pri tiuj ŝtonoj. Iuj aspektas kiel bestoj, aliaj kiel ĉinaj tradiciaj pentraĵoj, triaj kiel miniaturaj montaroj kaj kvaraj kiel gravaj kulturaj figuroj. Simple dirite, ĉio dependas de via libera imagino. El multaj kuriozaj ŝtonoj, ekspozicio pri “manĉur-hanaj pladoj” vekis grandan atenton de ni ĉiuj vizitantoj. “Manĉur-hanaj pladoj” estiĝis en ĉina lasta dinastio Qing kaj enhavis almenaŭ 108 pladojn, tial posteuloj prenas la nomon kiel simbolon de pompaj bongustaĵoj. Inter ili, oni povas vidi “batatojn”, “jubojn”, “pizojn”, “kalkumitajn ovojn” kaj multajn aliajn “manĝaĵojn”. Aprecante tiajn ŝtonojn, mi elkore admiras pri magiaco de la naturo, kiu donas al ni



multajn surprizaĵojn.

Dum la aprecado, ni ĉiuj interŝercis. Mi demandis Probal Dasgupta: “Ĉu vi vidis pladon da viandaĵo? Mi invitas vin gustumi ĝin!” kaj li respondis: “Bona gusto! Mi invitas vin gustumi tiujn pladojn. Kia estas la gusto?” La ĝardeno estas saturita de niaj ridoj.

5-an de decembro vendrede serena

Probal Dasgupta kaj mi malsaniĝis kaj, pli terure, tute perdis apetiton. Tiutage ni nur trinkis supon kaj iomete engluis legomojn. Dio bonbenu nin, ĉar sano ĉiam estas la plej valora dum la tuta vivo.

6-an de decembro sabate serena

Ĉi-matene ni frue ellitiĝis kaj akurate eniĝis en boaton, kiu sin stiris sur Li Jiang, patrino rivero de la Guilin-a popolo.

Tiutempe mi sidis ĉefenestre kaj laŭvole ĝuis eksteran pejzaĝon. Ambaŭborde estis diversformaj montoj kaj malfacile videblis konstruaĵoj. Sunlumo brilis sur riveroakvo, venteto karesis miajn vangojn, de tempo al tempo videblis surakvaj anasoj kaj surbordaj bovoj manĝantaj herbojn. Malproksimen rigardante, mi rimarkis, ke la antaŭokula pejzaĝo ŝajnas inka pentraĵo de Ĉinio. Interese, se via kapo libere imagos, tiuj diversformaj montoj aspektos kiel bestoj kaj eĉ konataj figuroj en legendoj. Neimageble, mi sentis min en la sino de la naturo kaj ĝuis naturan ĉarmon malfacile vidatan en urboj.

Intertempe tuj aŭdiĝis krioj "Rigardu antaŭen! Jen la Naŭĉevala Monto!" La monto estas bone konata pro vaste cirkulanta rakonto: Iufoje ĝuste en la sama loko, ĉina ĉefministro Zhou Enlai kaj ĉina vicĉefministro Chen Yi kalkulis surmontajn ĉevalsimilajn bildojn; dum Zhou Enlai vidis entute 9, Chen Yi 7, tial posteuloj diras, ke rango decidas kapablon vidi la nombron de tiuj ĉevalformaj bildoj. Ni ĉiuj ridete demandis unu la alian: "Kiom da ĉevaloj vi jam vidis?"

Brile rimarkinda estis tiutaga dramo "Impreso pri Liu Sanjie". Liu Sanjie (la ideogramo "liu" estas familia nomo, dum "san" signifas tri kaj "jie" fratino, tial Liu Sanjie signifas la trian filinon de familio Liu.) legenda figuro de ĉina zhuang-a naciminoritato, onidire kapablis kanti kaj forte oponis kontraŭ feŭdismaj sinjoroj. Nun mi turnu vian atenton al la dramo. Oni prenas la realajn Li Jiang kaj ambaŭbordajn montojn kiel “scenejon” de la dramo. Neimageble, ĉu ne? La tuta dramo estas nekredeble impona kun 700 geaktoroj. Karaj legantoj, vi certe ankoraŭ memoras la inaŭguron de la Pekinaj Olimpikoj, kies pompeco profunde impresas la tutan mondon. Fakte la dramo "Impreso pri Liu Sanjie" estas reĝisorita de s-ro Zhang Yimo, ĉefreĝisoro de la inaŭguro de la Pekinaj



Olimpikoj. La 80-minuta dramo ŝajnis al ni daŭri nur 20 minutojn. Finaprecinte la dramon, mi kaj Probal Dasgupta ankoraŭ longtempe dronis en la neimagebla imponeco de la dramo.

7-an de decembro dimanĉe nuba

Hodiaŭ ni vizitis ĝardenon, kiu kombinis naturajn pejzaĝojn kun la kulturo de lokaj naciminoritatoj. Ĉie videblis viveca remonto de la ordinara vivo de naciminoritatoj kaj ni fojfoje estis invititaj partopreni en interaktivigo. Iufoje zhuang-naciminoritanino de supre alĵetis broditajn pilkojn unu post alia, kaj ni, starante malsupre, konkursis kapti tiujn pilkojn ĵetitajn kiel donacetojn al turistoj. Mi surdorse portis pezan sakon kaj mane tenis alian saketon, tial mi prudente forlasis la konkurson kaj ĉeflanke aprecis kuraĝon de Probal Dasgupta. Bedaŭrinde li kaptis neniun broditan pilkon, dum altstatura egipta premiito Abobakr Mohamed Ali Aboelmagd kaptis 3. Kompatinda Probal Dasgupta! Tio estas konkurso de altuloj. Mi diris al li: “Vi bezonas esti pli alta por kapti pilkojn”.

Antaŭ ol flugi al Pekino posttagmeze, ni kunvenis kun estro de la Turisma Administracio de Guangxi kaj aliaj turismaj oficistoj, kiuj sincere petis de niaj premiitoj opiniojn kaj proponojn surbaze de semajna turismado tra la tuta provinco. Aliaj premiitoj malŝparis troajn vortojn al beleco de Guangxi kaj komplezemo de la loka popolo, escepte de Probal Dasgupta, kiu prezentis 2 sugestojn, nome, ĉiu hotelo liveru en matenmanĝo teon aŭ kafon kaj hoteloj disponigu ekstrajn klarigolibrojn multlingvajn en ĉambroj kaj tiamaniere oportunu klientojn. Probal Dasgupta sentis embarasiĝon kaj maltrankvile diris al mi: “Ĉiuj laŭdas, dum mi kritikas.” Sed ekster lia



atendo, li estis la unika parolanto eksplicite laŭdata de estro de la Turisma Administracio, kiu bedaŭrinde ricevis nur 2 sugestojn.

8-an de decembro lunde serena

Hodiaŭ estis la unua tago post nia reveno el la aŭtonoma regiono Guangxi. Nia unua celloko estis Tian'anmen, monde plej granda palaco, kiu povas enteni samtempe cent milojn da homoj; kaj dua celloko estis la Malpermesita Urbo, kie loĝis kaj laboris ĉinaj imperiestroj en Ming-dinastio kaj Qing-dinastio. La du cellokoj situas en la centro de Pekino kaj iasence estas kvintesenca centro de la ĉina popolo. La du lokoj vekis sufiĉe grandan intereson de Probal Dasgupta. Bedaŭrinde pro akutiĝanta gorĝodoloro, mi malmulte babilis kun Probal Dasgupta, kiu siaflanke intencis ne tro paroligi min. Malmulta bablado sed multa fotado! Probal Dasgupta ĉiufoje bonege pozis por mia fotado kaj de tempo al tempo petole eklevis la manon dum mia fotado. Li eĉ kelkfoje nomis min "mia kompatinda fotistino".

Dum aliaj kunvojaĝantoj butikumadis en Wangfujing, fama komerca strato apud Tian'anmen-Palaco, Probal Dasgupta rekte sin trudis en librovendejon. En la 3-a etaĝo ni vidis lernolibrojn de sufiĉe multaj fremdaj lingvoj, kiuj inkludas ne nur potencajn lingvojn kiaj la franca kaj la hispana, sed ankaŭ nepotencajn kiaj la nederlanda kaj la vjetnama. Neatendite, ni tie vidis ankaŭ E-lernolibrojn. Mia dio, kia trovaĵo! En la 1980-aj jaroj populariĝis E-libroj en librovendejoj, tamen poste ne plu.



9-an de decembro marde serena

Hodiaŭ nia celloko estis la Granda Muro, kiun Probal Dasgupta forte sopiris viziti. Li eĉ firme rifuzis alies proponon ne viziti la Grandan Muron por grava intervidiĝo, opiniante, ke ridindas por li, kiu estas en Pekino, ne viziti la Grandan Muron. Tie ne estis amasoj da vizitantoj pro vintra malvarmeco, tial ni feliĉe havis bonan okazon libere elekti niĉojn por fotado, starado kaj aprecio, alie ni konkursus okupi bonajn lokojn por fotado.

Probal Dasgupta estis en bona humoro kaj, de tempo al tempo kantis "forte staras muroj de miljaroj"

kaj tiel plu. Ĉu vi povas imagi, ke Probal Dasgupta estas la unusola, kiu ne kunportis fotilon al Ĉinio? Li sin eksplikis, ke post perdiĝo de fotilo antaŭ multaj jaroj, li ne plu uzas fotilon kaj lasas fotadon al la malfuŝaj manoj de la edzino kaj la filo. Mi ŝercis: "Iu ŝtelis ne nur vian fotilon, sed ankaŭ vian amon al fotado." Probal Dasgupta tute konsentis kun mia opinio.

Kiam mi diris al li, ke tempas por ni reveni al la aŭtobuso, li estis surprizita, ĉar li ankoraŭ ne sufiĉe lacis je aprecio de la Granda Muro. Tamen bedaŭrinde, mi kondukis lin retroiri laŭ la antaŭa vojo, dirante, ke li bezonas monatojn por fingrimpi la tutan Grandan Muron. Mi konsolis lin per fama diro de ĉina gvidanto Mao Zedong "Kiu ne sukcesas atingi la Grandan Muron, tiu ne estas heroo.", tial li jam estis heroo.

10-an de decembro merkrede serena

Hodiaŭ estis la lasta restado de Probal Dasgupta en Ĉinio. Oportune de libera tempo en antaŭtagmezo, li iris al Komunika Universitato de Ĉinio por doni lecionon al studentoj de tiea E-kurso. Jam de 3 jaroj tiuj studentoj lernas nian lingvon Esperanto en tiu universitato. 45-minuta parolado de Probal Dasgupta vekis grandan intereson de studentoj, kiuj, post finiĝo de la parolado, forte postulis alian 45-minutan paroladon. Kompreneble ĉio iris laŭ la volo de studentoj, kiuj poste ĝoje akceptis mian proponon pri fotiĝo kun Probal Dasgupta. Ili diverspozis dum fotado kun Probal Dasgupta. Vidante tiujn junajn studentojn, mi sentis min sufiĉe maljuna. Oh, mia dio! Ŝajnas, ke mi kaj ili estas en malsamaj generacioj.



Tagmanĝinte, mi akompanis Probal Dasgupta al pekina ĉefurba flughaveno, de kiu li flugis al Barato. Ĝis, kara Probal Dasgupta!

Nun mi komplete finu konigon pri mia 13-taga vojaĝo kun Probal Dasgupta en ĉina aŭtonoma regiono Guangxi kaj en Pekino. Oni povas scii pli multe da interesaj informoj kaj vidi pli multe da belaj fotoj en nia reta rubriko: <http://esperanto.cri.cn/121/2008/11/26/Zt1s89202.htm> Tie notiĝas ĉio pri la vojaĝo. Bonvole kontribuu viajn opiniojn al mi: lina68@tom.com.

Probal Dasgupta: Esperanto estas mia mentoro

S-ro Probal Dasgupta, kiu naskiĝis en 1953 en Kolkato de Barato, estas nuna prezidanto de Universala E-Asocio, organizo de tutmondaj esperantistoj. Li samtempe estas vicprezidanto de Akademio de Esperanto, honora membro de Lingvistika Societo de Usono kaj lingvistika profesoro en Barata Statistika Instituto. Krome, li ankaŭ estas fidela aŭskultanto de E-elsendo de Ĉina Radio Internacia.



Mikrofone: Nuntempe vi estas prezidanto de Universala E-Asocio. Kiel vi konatiĝis kun Esperanto?

Probal: Mi la unuan fojon aŭdis pri Esperanto en sciencfikcia verko de la bengala verkisto Premendro Mitro, kiam mi estis 10-jara. En la verko estas iu homo Shishir, kiu agas iom fantaziece. Por ke iu interkonsento estu internacie valida kaj diskonigebla, Shishir verkis ĝian malneton en internacia lingvo Esperanto. Mi poste pli bone konatiĝis kun Esperanto pere de populara scienca verko pri lingvoj verkita de profesoro Mario Pei de Usono. Tie estas sufiĉa prezento ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pri la tuta internacilingva demando kaj ĝia historio. Tiam mi decidis, ke en la venonta somero mi iom okupiĝu pri Esperanto. Somere de 1967, kiam mi ankoraŭ ne estis 14-jara, mi komencis lerni Esperanton. Jen mia grandega surprizo, fine de tiu somero, mi jam sufiĉe sciis Esperanton, ke mi povis kaj do volis iel uzi la lingvon. Mi kontaktiĝis kun barata instituto de Esperanto. Mi poste fariĝis ano de Koresponda Servo Mondskala kaj komencis havi korespondajn amikojn en diversaj landoj pere de Esperanto. Oni ankaŭ aligis min al Universala E-Asocio. Mia patro pagis kotizon por mia dumviva membreco de UEA. De 1970, mi estas dumviva membro de UEA.

Mikrofone: Antaŭ via prezidantiĝo de UEA, ĉu vi multe vin trudis en E-movadon?

Probal: En 1977, oni varbis min por la movado en la senco, ke Simo Milojević, kiu tiam estis vicdirektoro de la Centra Oficejo de UEA, persone venis al Nov-Jorko kaj diris al mi: “Se UEA ebligos vian alvenon al UK en Rejkjaviko, ĉu vi efektive venos? Sed UEA pagos viajn biletojn nur se vi faros laborojn. Vi devas labori pli malpli ĉiun nokton. Vi tute ne havos tempon por dormi dum semajno. Ĉu tio estas ebla por vi?” Mi tiam estis 24-jara kaj ne aparte bezonis dormi. Mi diris “tute bone” al li. Simo ne troigis. Mi havis nenian tempon por dormi. Mi tiam lernis, ke por ke UK glate fluu kaj aspektu normala, iuj homoj devas nenormale multe kaj malagrabla labori. Tio estas ĉefa lernaĵo en Esperantujo. Kaj mi tre ĝojas, ke dum mia unua UK, mi lernis tion. Tuj post la UK, mi volontule laboris tri semajnojn en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo por kune kun Simo pretigi la kongresan numeron de la revuo. Verŝajne, tio estas io rakontinda pri mia esperantista vivo.

Poste dum 8 monatoj de la fino de januaro ĝis la fino de septembro, 1980, mi estis volontulo de la Centra Oficejo de UEA. Tiutempe mi servis ĉefe kiel funkciiganto de la libroservo kaj ankaŭ helpanto de la redaktoro de revuo, ĉar Simo respondecis kaj pri libroservo kaj pri revuo. Mi kompreneble lernis elementojn de aliaj laboroj en la oficejo kaj funkciigis mian parton de oficeja administrado. Estos tede rakonti pri intertempaj spertoj; la publiko perdos la paciencon. Mi simple rapidu al 2007, kiam oni elektis min kiel prezidanton de UEA en la Jokohama UK.

Mikrofone: Dum via esperantista vivo, ĉu iuj aliaj influis aŭ influas vin?

Probal: Jes. La unua homo estas s-ro Lakshmiswar Sinha. Kelkajn monatojn por mia lernado de Esperanto, mi eksciis, ke centon da kilometroj for de mia urbo ekzistas maljuna pioniro de Esperanto, kiu en 1928 lernis Esperanton en Svedio. Mi iris al Santiniketan, kie loĝis tiu pioniro s-ro Sinha. Mi ofte vizitis lin por legi lian grandan kolekton da E-libroj kaj gazetoj. Li pensis, ke estas malŝparo de mia tempo tion fari, kaj ke eble estas pli multaj homoj en Kolkato, kiuj interesiĝas pri Esperanto. Do li proponis en 1969, ke li donacu sian tutan E-kolekton al la nacia biblioteko de Barato, kiu situas en Kolkato. Je tiu propono, la nacia biblioteko skribis al li, ke ĝi pretas transpreni tiujn librojn sed neniu en la nacia biblioteko scipovas Esperanton kaj do estos malfacilo krei katalogon. Mi

tiam diris, ke post mia ekzameno mi havos 6 liberajn monatojn kaj pretas volontuli en la biblioteko. La biblioteko devis krei specifan permesilon por ke mi eniru en la bibliotekon, ĉar tiam mi estis nur 16-jara kaj laŭregule ne rajtis eniri. Tra tiuj 6 monatoj mi ĉiutage legadis E-librojn kaj gazetojn. Multaj diris al mi, ke estas privilegio por mi, en la aĝo de 16 jaroj, havi okazon dum 6 monatoj legi tiom da E-libroj kaj gazetoj. Evidente s-ro Sinha estas mia ĉefa E-mentoro, kiu helpis min plibonigi mian Esperanton.

La alia homo, kiu persone interesiĝis pri mia evoluo, estas doktoro Victor Sadler. Li proponis transdoni al mi la taskon traduki el la bengala lingvo al Esperanto iujn poemojn de la Nobel-premiita bengala verkisto Robindronath Tagore, kiujn li mem antaŭe klopodis traduki. Mi transprenis de li la taskon kiam mi estis ankoraŭ ne 16-jara. La manuskripto, kiun mi produktis en 1 aŭ 2 jaroj, pro cirkonstancaj kialoj – ligitaj al la kopirajtaj demandoj – montriĝis ne eldonebla. La kopirajtaj demandoj aperis, ĉar temis en kelkaj kazoj pri tradukoj pere de la angla. Sekve oni petis min tute forigi tradukojn pere de la angla kaj fari tradukojn rekte el la bengala. Do mi dum 4 jaroj plenumis tiun taskon dum mi estis studento pri lingvistiko en Kolkata Universitato. La tradukita libro plaĉis al multaj homoj kaj ial furoris. Ĝi estis amase legata. Ĝi eĉ trafis la recenzan atenton de poetoj kiel William Auld kaj Marjorie Boulton.

Mikrofone: Ĉu ankaŭ viaj familianoj estas esperantistoj?

Probal: Mia patro ne lernis Esperanton sed subtenis ĝian idearon. Li pagis mian kotizon en 1970 por ke mi fariĝu dumviva membro de UEA. Mia patrino en la 1980-aj jaroj lernis Esperanton formale en kursoj. Ŝi estas tiusence oficiala kursofininto. Ŝi ne tre uzas Esperanton sed kapablas legi. Ŝi ankaŭ permesis al mi traduki 2 siajn librojn en Esperanton, kiuj ricevis relative bonajn recenzojn. Ŝi estas kontenta, ke iuj ŝiaj libroj atingis la publikon pere de Esperanto. Mia edzino ankaŭ estas esperantisto kaj subtenas Esperanton. Mia filo estis esperantisto kaj subtenis Esperanton ĝis li estis 12-jara, sed poste mankas al li interesiĝo pri Esperanto.

Mikrofone: Ĉu vi volus doni konsilojn al E-lernantoj?

Probal: Mi dirus, ke tiu, kiu komencas lerni Esperanton, devus relative rapide serĉi metodojn por uzi Esperanton. Mi dirus ĉefe, ke esperantistoj parolu kaj skribu en Esperanto kiel eble plej ofte kaj ke ĉiu persono difinu al si klarajn celojn de kvanto,

kvalito kaj tiel plu pri parolado kaj skribado surbaze de sia normala vivordo. Oni evitu ekcesojn. Mi dirus persone, ke Esperanto en la vivo de iu homo estas iu formo de sporto aŭ sinekzerco. Pensu pri ĝi kiel vi pensus pri sporto aŭ pri korpa ekzerco. Ĉu vi volas ludi tenison dum la tuta tago? Verŝajne ne! Ĉu vi eble ludos unu horon tage, eble tri horojn semajne? Faru tion kun via Esperanto. Ĝi estas nobla hobbio, kiel diris Kalocsay.

Mikrofone: Ĉu vi estas aŭskultanto de E-elsendo de Ĉina Radio Internacia?

Probal: Mi devas persone tuj diri, ke mi estas unu el viaj fidelaj kaj vivantaj aŭskultantoj de 1968, kiam mi la unuan fojon komencis aŭskulti radio-elsendon de Ĉina Radio Internacia.

Mikrofone: Ĉu vi havas bonajn proponojn por nia E-elsendo?

Probal: Laŭ mi, nun ekzistas la ebleco de podkasto kaj sondosieroj, kiuj oni povas meti en retujon por libera dispono fare de aŭskultantoj. Estas bona ideo, ke Ĉina Radio Internacia kreu kelkajn sondosierojn por infanoj. Familioj kun aŭskultantaj infanoj povas elŭti por distri infanojn same kiel antaŭaj generacioj per libroj eldonitaj en Ĉinio. Unuhora elsendo ĉiutage ne estas sufiĉa niĉo por infanoj. Kaj mi kredas, ke multaj familioj kun E-aŭskultantaj infanoj efektive interesiĝos. Unu ebleco, kompreneble, estus vendi ilin. Laŭ mi se vi disponigos specimenojn por ke homoj interesiĝu, eble tio akcelos la vendojn. Mi mem ne estas bona spertulo pri merkato, sed se tia ideo montriĝos al viaj spertuloj uzebla, eble vi povos ion fari.

Mikrofone: Laŭ vi, kian rolon ludas Ĉina Radio Internacia en Esperantujo?

Probal: Mi salutas ĉiujn aŭskultantojn pere de tiu ĉiu plej universale aŭskultata Esperanto-elsendo en la nuntempa mondo en la nomo de Universala E-Asocio, kiu estas la plej universala asocio de esperantistoj en la nuntempa mondo. Mi scias, ke ĝi estas vaste aŭskultata kaj aprecata, kaj ke multaj homoj dependas de Ĉina Radio Internacia por havi tre klaran bildon de la parolata Esperanto. Kompreneble la enhavo de E-elsendo de Ĉina Radio Internacia estas tre zorge fasonita. Mi kredas, ke la radio facile povas preni publikan subtenon de aŭskultantoj en la formo de interagado kun la publiko. Precipe se oni ampleksigos la retan diskutadon jam funkciantan, ĝi fariĝos internacia atentata diskutforumo. Tian potencialan forton havas Ĉina Radio Internacia.



Tra la Mondo – 世界各地

94-a UK okazos en Zamenhof-naskiĝurbo

La 94-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, 2009 en naskiĝurbo – Bjalistoko, Pollando. La 15-an de decembro, 1859, en Bjalistoko naskiĝis la kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto, d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. En 2009 oni celebros la 150-an naskiĝdatrevenon de la plej fama bjalistokano.

Tre konvene UN proklamis la saman jaron Internacia Jaro de Interpaciĝo. Estis do nature, ke inspirite de tiu koincido, UEA elektis "'Krei pacan ponton inter la popoloj': Zamenhof hodiaŭ" kiel temon de la kongreso kun du dimensioj.

Bonvenon por kunfesti la jubileon!

La Komuna Seminario de junularoj okazos en Jokohamo

De la 27-a ĝis la 29-a de decembro, 2008, okazos en Jokohamo, la 27-a Komuna Seminario de la junularoj ĉina, korea kaj japana kun la ĉeftemo: Ekologio en mia ĉiu-taga vivo. La Seminario okazas ĉiu-jare inter la tri landoj. Oni bonvenigas partoprenantojn ankaŭ el aliaj landoj.

Partoprenu en la 8-a Internacia Himalaja Renkontiĝo

Nepala E-Asocio anoncis, ke la 8-a Internacia Himalaja Renkontiĝo okazos en Katmanduo kaj Anapurna, Nepalo, de la 26-a de februaro ĝis la 10-a de marto, 2009. La partoprenantoj spertos montaran vilaĝan vivon kaj ĝuos majestajn vidaĵojn de

Himalaja-montaro.

Invito al la Eŭropa kaj Germana Esperanto-Kongresoj

La 86-a Germana Esperanto-Kongreso okazos de la 28-a de majo ĝis la 3-a de junio, 2009 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. La ĉeftemo: Esperanto por multkultura Eŭropo.

Dum la kongreso okazos ankaŭ Eŭropa Kongreso organizata de Eŭropa Esperanto-Unio sub la temo: Signifo de la falo de Berlina muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo. Oni antaŭjuĝis, ke la Kongresoj certe estos grandiozaj kun multaj pozitivaj surprizoj en la atmosfero de la ankoraŭ nova Esperanto-urbo.

Petro Zilvar

Nova Esperanto-Muzeo en urbo Svitavy, Ĉeĥio

Laŭ kunlaboro de Ĉeĥa E-Asocio kaj gvidaj instancoj de la urbo Svitavy, la 20-an de septembro ĉi-jare en la urbo ekfunkcios nova publike vizitebla Esperanto-Muzeo.

En la salono estas vitroŝrankoj kun ekspozicio de libroj. Sur la muroj estas 13 kadroj kun tekstoj pri Esperanto-movado. Meze de la salono troviĝas busto de Zamenhof kaj ĉirkaŭ ĝi estas kelkaj vitrotabloj, kie sub vitro estas diversaj materialoj (simile kiel en Vieno).

Petr Chrdle, Miroslav Malovec

Mikronovelo – 微型小说

Kelnerino



La nokta klubo Mango intencis aldoni al si unu laŭhoran kelnerinon. Multe da fraŭlinoj venis sin anonci. Fine ĝia mastro elektis Aqing, 3-aklasan studentinon el anglalingva fakultato de la universitato S, kvazaŭ trovante trezoron pro tio, ke ŝi ne nur estis figure ĉarma kaj kvalite alta, sed ankaŭ lerte parolis en la angla.

La tasko de Aqing estis, ke de la 19-a horo ĝis la 24-a ŝi servu en kupeo per trinkaĵo. 10 juanojn al ŝi por unu horo, plus bakŝiŝo, sufiĉe multa do estis la honorario. Tamen tre alta estis postulo de la mastro.

Aqing komencis sian laboron. Ŝi servis al administratoro Gao, fakte parvenuo kun kruda aspekto.

“Ŭa ŭa! Fraŭlineto, ne ne, sed feineto!” kriis ekstaze la administratoro, apenaŭ enkupeigis Aqing.

Ridetante ŝi levis tason da varma teo sur pleto kaj metis milde ĝin sur la tablon.

“Momenton!” Gao prenis la gracian maneton de Aqing. “Mi postulas surgenuan servon. Ĉiufoje 10 juanojn da trinkmono al vi. Nu, kiel do?”

Surprizite ŝi gapis. Post longa tempo fine ŝia animo revenis. “Pardonon, sinjoro! Ni ne donas tian servon.” Mildis ŝia voĉo, rigidis ŝia rideto kaj firmis la tono.

“Ĉu?” Li lasis ŝian manon kaj premis elektran vokbutonon.

Baldaŭ aperis la kalva kapo de la noktokluba mastro. Kaj la kliento ripetis la postulon.

“Aqing,” persvadis la mastro. “Ne legiĝas tia servo en la kontrakto. Tamen ni devas laŭeble kontentigi ĉiun honoran gaston. Cetere, la bakŝiŝo estas tre multa.”

Ŝi konsterniĝis.

Tiam li turnis dolĉan rideton al Gao kaj diris humile, “Ĉi tiu estas novicino, ankoraŭ ne akomoda. Mi venigu iun alian, pli...”

“Ne! Ĝuste ŝin!” Nubo sin eksternis sur la vizaĝo de

la kliento.

“Tio—“ La mastro embarasiĝis.

“Ne necesas ŝanĝo. Mi do mem!” Aqing sin regis por ne larmi.

“Tio ja estas ĝusta kaj racia.” For la nubo de sur la vizaĝo de Gao, kiu elsakigis stakon da monbiletoj kaj – frap’! – sur la tablon. “Fraŭlineto, bone min plezurigu! Ĉiom da mono al vi.”

“Sinjoro, momenton! Baldaŭ mi revenos.” Ŝi tenere diris. Ridis la mastro, serene kaj signifplene.

Ŝi reaperis, ŝminkita kaj ornamita ore kaj arĝente. “Estimata sinjoro, kiom da mono vi pretas elspezi por mi ĉi-vespere?” Sekvis sekse ĉarma rideto.

“Cent juanojn, duoblon de via salajro.”

“Bone, sinjoro! Sed, ĉu mi povas fari demandon, nur unu?”

“Nu!”

“Ĉu vere mono povas akirigi ĉion?”

“Certe!” Subite li viglis pri io el ŝia demando. “Kion tio signifas?”

Ŝi aplombe eksidis en sofo. “Sinjoro, ĉi-vespere ni interŝanĝu la pozicion. Bonvole faru surgenuan servon al mi. Mi donos al vi 10-oblon de 100 juanoj.”

Post ioma surpriziĝo, “Vere?” Lia demando entenis ironion kaj koleron.

“Mi ne perfidos la vorton!” Severiĝis ŝia mieno.

“Bone! La monon!” Kaj li etendis la manon al ŝi.

Frap’! La tetablo iom tremis pro alfrapiĝo de karto “Ora Spiko” el la Ĉina Popola Agrikultura Banko. “Genuiĝu!” ŝi kriis ordone.

Kolapsis tiu Gao. Dio! Ora Spiko? Riĉulino! ... Ruĝa nubo ŝvebis sur lia facio. Li forkuris terurite, forpreninte sian monon.

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	kHZ
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



CRI
CHINA RADIO INTERNATIONAL
中国国际广播电台

北京2008年奥运会授权转播商
Rights Holding Broadcaster of
the Beijing 2008 Olympic Games

CRI online
Esperanto

<http://esperanto.cri.cn>
(2008年第四期 总第24期)

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn
Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040